# Leciono 11

(Enkonduko por la ekzercoj pretigitaj por la kompleto ***Pasporto al la tuta mondo***)

### *Resumo de la rakonto:*

La detektivo venas por minaci Georgon pro uzo de falsita mono; prefere li trovu kaj redonu la notlibron. Dum la parolo, la detektivo manĝas multe da la restanta kuko. Ĉiuj aliaj jam suferas pro la kuko. Nina, atletino, venas por organizi maratonon. Ŝi nomas la detektivon difektito! Ŝi ne sukcesis interesi Karlon pri la maratono; sed multaj aliaj aliĝis. Georgo parolos al ŝi pri ne-regulaj verboj kompare al neregulaj manĝaĵoj. Ruselo kaj la ŝafo devas tuj iri hejmen al Nov-Zelando por savi la ŝafaron. Li enpoŝtigas mesaĝon al Helena kune kun la bela am-poemo de Karlo, kaj la perdita notlibro de la detektivo. Ĉio aspektas malbone por la estonteco de kafejo Zamenhof kaj la familio.

### *Resumo de la rakonto laŭscene:*

**Sceno 1:** Jolanda, Helena kaj Filisa ĉiuj malsanas. Ĉu kulpas la kuko? Filisa ne kredas tion.

**Sceno 2:** La ŝafo de Ruselo ricevas tele-mesaĝon el Nov-Zelando. La tuta ŝafaro malsaniĝis. Ili devas tuj foriri por savi ilin.

**Sceno 3:** Atletino Nina venas en la kafejon kun afiŝo por maratono. Ŝi volas ke oni elmontru ĝin en la kafejo, sed Georgo konsideras la peton el (mis)filozofia vid-punkto. La detektivo alvenas subite kaj deklaras la kafejon fermita.

**Sceno 4:** La virinoj plue suferas. Karlo ne suferas, kaj nur li ne manĝis la kukon. Eĉ Ken, Flora kaj la profesoro suferas.

**Sceno 5:** En la kafejo, la detektivo kaj Nina insultas unu la alian kaj Nina foriras.

**Sceno 7:** La detektivo diras ke la kafejo estas fermita ĉar Georgo aĉetis meblojn per falsita mono. Dume Georgo proponadas la kukon, kiun la detektivo volonte manĝadas. Georgo ne povas trovi la kontrakton de la bankisto, kiu donis la monon. Tamen, eble la kafejo ne devos fermiĝi, se...

**Sceno 8:** Helena estas ŝokita kaj mizera ĉar Ruselo senanonce foriris. Helena svenas.

**Sceno 9:** Ankaŭ Karlo estas mizera. Almenaŭ li ne svenas. Se li povus verki poemon...

**Sceno 10:** Jen la propono de la detektivo. Se Georgo trovos kaj redonos la notlibron de la detektivo, eble la kafejo povos resti kaj Georgo ne devos iri al prizono.

**Sceno 11:** Karlo provas verki poemon. Sed mankas al li papero. Nina alvenas kaj provas konvinki lin partopreni en la maratono. Ŝi donis afiŝon, do Karlo almenaŭ ekhavas paperon.

**Sceno 12:** Georgo estas plene konfuzita. Li ekscias pri la venenita kuko kaj la foriro de Ruselo kun la notlibro kiun li bezonas por eviti prizonon.


### *Gramatikaj temoj:*

La verboj en Esperanto estas regulaj, kontraste al naciaj lingvoj. Sur la sekva paĝo ni resumas la tempojn, kune kun la nova verb-finaĵo por la kondicionalo: ***-us***; uzo de **se** kun ***-us***;

Simplaj vort-ŝercoj: mara tono kaj tona maro; afiksoj ***-ad-*** (ripeto: verkadus = verkus daŭre aŭ ofte), ***-ar-*** (kolekto: ŝafaro = grupo da ŝafoj), ***-end-*** (devigo: manĝenda kuko = kuko, kiun oni devas manĝi) kaj ***-um-*** (malpreciza; maratonumi = kuri en maratono; vortumi = esprimi ion per vortoj).

### *Esperantaj temoj:*

Esperanto kiel avangardaĵo, am-poemoj, "volapukaĵo!", Belartaj Konkursoj de UEA, la barbeco de Zamenhof, Boulton kaj katamo.



# Resumo de la verbo-tempoj en Esperanto

| Finaĵo | Nomoj | Uzo: Por... | Ekzemploj | Notoj |
|---|---|---|---|---|
| -AS | Prezenco<br>Nuno<br>As-tempo | io nune okazanta<br>io long-daŭra<br>io kutima | Mi batas la pilkon.<br>Mi dormas.<br>Mi studas en universitato.<br>Mi suferas pro alergioj. | komencita, nefinita<br>komencita, nefinita<br>Vi ne nepre studas aŭ suferas en la dira momento. |
| -IS | Pasinto<br>Paseo<br>Preterito<br>Is-tempo | subita ago okazinta<br>io daŭra sed finita.<br>kutimo finita. | Mi rompis vazon hieraŭ.<br>Mi loĝis tie dum 2 jaroj.<br>Mi laboris en kafejo de 1976 ĝis 1979. | okazinta.<br>komencita kaj finita.<br>kutimo komencita kaj finita (vi ne laboris 24 horojn tage!) |
| -OS | Futuro<br>Estonto<br>Os-tempo | estonta ago.<br>estonta daŭraĵo.<br>estonta kutimo. | Mi venos morgaŭ.<br>Mi loĝos en Parizo ekde majo.<br>Mi vizitos kinejojn pli ofte tie. | por momenta ago.<br>por konstantaĵo.<br>por ripeta intenco. |
| -U | Imperativo<br>Ordona<br>modo | petoj<br>ordonoj | Aŭskultu, mi petas.<br>Silentu kaj aŭskultu!<br>Estas grave, ke li venu.<br>Ni preĝu, ke li venos. | Plej ofte, la subjekto estas subkomprenata: "Vi aŭskultu" |
| -I | Infinitivo | nomi verbon.<br><br>konstrui modalajn verbojn por esprimi kapablojn, dezirojn kaj devojn. | La verbo "esti" ne ekzistas en ĉiuj lingvoj.<br>Mi devas respondi al vi.<br>Mi volis veni, sed ne povis.<br>Mi povos veni morgaŭ.<br>Mi sukcesis solvi la taskon. | La verbo estas la motoro de la frazo. Pensu pri aŭto. Ĉiu verbo-finaĵo funkcias kiel unu rapiduma pozicio. La infinitivo estas la verbo en sia "neŭtrala" pozicio, preta por eklabori. |
| -US | Kondicionalo<br>Kondiĉa<br>tempo | paroli pri eventoj, kiuj verŝajne ne okazos. | Mi dirus, se li venus.<br>Mi diros, se li venos.<br>Mi dirus, se li ne ĉeestus. | Mi dubas, ke li venos.<br>Mi kredas, ke li venos.<br>Mi certas, ke li ĉeestas. |
| -ANTA | Aktiva prezenca participo | formi adjektivon<br><br>formi kompleksan tempon | La kuranta knabo svingis al ni.<br><br>Kiam Georgo alvenis, Karlo estis verkanta poemon.<br>"Silentu! Mi estas verkanta!"<br>Morgaŭ, li estos verkanta. | kuranta = kiu kuras<br><br>Uzu por agoj aŭ statoj jam komencitaj kaj nefintitaj je iu difinita tempo-punkto – antaŭa, nuna aŭ estonta. |
| -INTA | Aktiva pasinta participo | formi adjektivon<br><br>formi kompleksajn tempojn pri agoj jam finitaj je iu tempo-punkto. | La kurinta knabo falis teren.<br><br>Ĉi-nokte, li estos veninta.<br>Jes, li estas veninta.<br>Eĉ hieraŭ li estis veninta. | kurinta = kiu ne plu kuras.<br><br>Ekzemple, li venos vespere.<br>Li ĵus aŭ jam venis.<br>Ekzemple, li eble venis antaŭ-hieraŭ. |
| -ONTA | Aktiva futura participo | formi adjektivon<br><br>formi kompleksajn tempojn pri agoj okazontaj je iu tempo-punkto. | La kuronta knabo kaŭris preta.<br><br>Komenchoro de la maratono por Nina kaj la aliaj: 10.00h.<br>Morgaŭ je 09.59, ŝi estos kuronta.<br>Nun estas 09.59, ŝi estas kuronta.<br>Hieraŭ je 09.59, ŝi estis kuronta. | kuronta = kiu kuros.<br><br><br><br>Tiam, ŝi estos kuropreta.<br>Ŝi estas kuropreta.<br>Tiam, ŝi estis kuropreta. |
| -ATA | Pasiva prezenca participo | formi adjektivon<br><br>formi kompleksan tempon. | La konfuzata Georgo babilas pri ŝafoj.<br><br>La detektivo surmetas falsan barbon. Georgo estos trompata.<br>La detektivo donas falsan monon. Georgo estas trompata.<br>Dum ĉeesto de la barbulo, Georgo ne sciis, ke li estis trompata. | |
| -ITA | Pasiva pasinta participo | formi adjektivon<br><br>formi kompleksan tempon. | La perdita notlibro enhavas gravan sekreton.<br><br>Ĉiu aldonos ion strangan al la kuko, baldaŭ ĝi estos venenita.<br>Baldaŭ eĉ la detektivo scios, ke la kuko estas venenita.<br>Pasis tri tagoj kaj la kuko estas for, certe ĝi estis venenita. | |
| -OTA | Pasiva futura participo | formi adjektivon<br><br>formi kompleksan tempon. | Ĉiu estas malĝoja pro la fermota kafejo.<br><br>Post momento, Nina eniros la kafejon estas estos konfuzota.<br>Nina nun eniras la kafejon, ŝi estas konfuzota.<br>Nina elvenas. Nun ŝi scias, ke kiam ŝi eniris, ŝi estis konfuzota. | |